SEPT./OCT. 1939 No. 5/6 24e JAARGANG

NEDERLANDA KATOLIKO

MAANDBLAD v.d. NED. BOND VAN KATH. ESPERANTISTEN „NEDERLANDA KATOLIKO"
GEVESTIGD TE 's-HERTOGENBOSCH
Opger. 29 Aug. 1909
BISSCHOPPELIJK EN KONINKLIJK GOEDGEKEURD
GEEST. ADVISEUR: HUB J. A. M. ERAS, PASTRO

Abonnementspr. f 2,50 p. jaar. Eksterl. Jarabono f 3,—
Afzonderl. Nos. 20 ct. Advertentiën 50 ct. per regel
ADVERTENTIËN: DRUKKERIJ PIET SMITS - TILBURG

Wat nu?

De oorlogsdemon vraagt weer alle tegenwoordige en toekomstige energie voor haar vernielende werking. De vooruitgang staat stil.
Het is te begrijpen dat in deze omstandigheden vele afdelingen hun jaarlijkse propaganda-avond hebben uitgesteld. Uitgesteld voor onbepaalde tijd. Immers, vele besturen zijn ontwricht en tal van werkers zijn elders geroepen. Het verenigingsleven stagneert. Voorgenomen werkzaamheden en ontworpen plannen blijven liggen.
Wat nu?
In geen geval de moed verliezen. In alle geval: zoveel mogelijk vast houden wat we hebben, in stand houden wat bestaat en..... ons voorbereiden op betere tijden,
Hier en daar is misschien nog wat te bereiken. Zo b.v. onder militairen. En ook komen, door persoonlijk contact met leden, er hier en daar nog enkelen op een cursus.
Maar zeker is dat de komende propagandaloze tijd besteed kan worden aan verdieping en verbreding van eigen kennis. E. moet worden geleerd op de eerste plaats door de Esperantisten. Dit woord van *Kabe* geldt nog steeds.
Al kunnen we N.K. dan niet met meer leden vergroten, we kunnen N.K. versterken met *beter* leden. Beter, ook wat betreft het kennen van Esperanto.
Komen dan betere tijden dan kunnen we met meer overtuiging en met meer recht, dus met meer succes weer propaganda gaan maken.
Hier een taak voor de komende maanden. Geef de leden de gelegenheid om in een grondige vervolgcursus te werken aan de verbetering van hun Esperantokennis. Dan zal er in N.K. toch nog vooruitgang zijn.

★★★

Impresoj Antverpenaj.

I.K.U.E. DORMANTA.

Antaŭ deko da jaroj nia kara ,,I.K.U.E.'' travivis periodon de malforteco. Aŭguston 1931 en Eindhoven tamen okazis ĝenerala kunveno, kvankam oni ne kuraĝis paroli pri kongreso. Sed pri kongreso oni decidis tie, kaj ĝi fakte okazis la sekvantan jaron, do 1932, en Lourdes. De nun oni perdis la kontakton kun la prezidanto de I.K.U.E., pastro Font-Giralt, kiu ankoraŭ prizorgis la eldonon de ,,Espero Katolika. ,,En tiu periodo ,,I.K.U.E.'' do nur vegetis; pri tiu fakto la Katolikaj Esperantistoj sentis egan bedaŭron. Speciale ankaŭ en Nederlando. Kiam en la jaro 1934, ,,Nederlando Katoliko'' preparis la feston pri sia 25-jara ekzistado, la ĉefestraro sendis inviton al la ĝenerala sekretario de ,,I.K.U.E.'', por ke en Aŭgusto 1934 okazu kongreso de ,,I.K.U.E.'' en 's-Hertogenbosch. Tamen la sekretario ne kuraĝis akcepti tiun inviton, ĉar — kiel jam ni menciis — li ne plu havis kontakton kun sia prezidanto, pastro Font-Giralt. Tiam la ĉefestraro de ,,N.K.'' iniciatis kunvoki diverslandajn ,,I.K.U.E.''-anojn, invitante ilin viziti la jubilean-kongreson de ,,N.K.'' en 's-Hertogenbosch. Fakte aperis sufiĉe multaj diverslandaj katolikaj Esperantistoj, kaj sabaton 18 Aŭguston okazis la grava priparolado, dum kiu oni decidis restarigi ,,I.K.U.E.'' kaj eĉ okazigi kongreson de ,,I.K.U.E.'' en Romo, Aŭguston 1935.

I.K.U.E. REVIVIGITA.

La kongreso en Romo okazis kaj de tiam ,,I.K.U.E.'' rekomencis iom post iom sian normalan agadon. Ne ĉio faktiĝis en plena kvieteco, sed tio ne gravas, ĉar la finrezultato estis bona. Post Romo okazis regule ĉiujare la kongreso, sinsekve 1936 en Brno, 1937 en Hago, 1938 en Ljubljana, 1939 en Antverpeno.

KONGRESO EN ANTVERPENO.

Ĉiujn ĉi sinsekvajn okazintaĵojn pripensis la reprezentanto de ,,Nederlanda Katoliko'', kiam li forvojaĝis al la Antverpena kongreso de I.K.U.E., la 21a en la vico. Kompreneble ĉiu kongreso havas sian specialan karakteron kaj sian propran sferon. Pri la Antverpena manifestacio mi povas ĝoje raporti ke ĝi vere sukcesis. La vizitantaro estis kontentige granda kaj la organizadon mi povas nomi vere modela. Multan dankon ni ŝuldas al la organizintoj, ĉiuj modestaj sed fervoraj kaj agemaj laborantoj sur la tereno de nia katolika Esperanto-movado.

LA SFERO EN ANTVERPENO.

La sfero dum tiu kongreso en Antverpeno estis vere amika, kvieta kaj serena. Ni sentis nin absolute hejme kaj ĉirkaŭataj de amikoj. En tia sfero la laboro estas facila kaj eĉ agrabla. Kaj la kunvenoj finiĝis ĝustatempe. La tuta aspekto de la urbo Antverpeno estas gaja, alloga kaj hejmeca. Tion scias la Nederlandanoj, ili estas regulaj vizitantoj de la Skeldo-metropolo. Tion ni konstatis kaj spertis dum la kongreso. Holland

estis atuto en Antverpeno komence de Aŭgusto. Ankaŭ ĉe la kongreso, ĉar almenaŭ 100 Nederlandanoj vizitis la Antverpenan kongreson. En tiu senco la kongreso estis ankaŭ vere internacia. Tamen, ĉar la Belgaj Esperantistoj estas plejgrandparte Flandroj, la Nederlanda lingvo estis senkontraŭdire la „dua" lingvo de la kongreso.

Ĉeestis la kongreson ankaŭ diversaj Francoj, unu Anglo, kompreneble nia ĉiam kaj ĉie ĉeestanta pastro Carolfi el Bari, kaj fervorega ĉefestraranino, fraŭlino Helene Fiedler, el Hungara Peĉs, kun kelkaj samlandaninoj. La Flandroj montriĝis afablaj gastigantoj, fervoraj propagandistoj, senlacaj laborantoj, bonaj organizantoj. Ili meritas nian dankon. Ke la kongreso estis bone aranĝita kaj certe sukcesis, pri tio ni aŭdis unuvoĉan certigon.

LA SOLENAĴOJ.

La solenaĵoj dum la kongreso estis impresigaj kaj multaj. Dimanĉon, la 6-an Aŭguston okazis la solena sankta Meso en la Antverpeno ĉefpreĝejo, la bela sanktejo de la Dolĉa Dipatrino. Bedaŭrinde Lia kardinala Moŝto van Roey, ĉefepiskopo de Mechelen kaj primato de Belgujo ne povis ĉeesti la ceremonion, pro necesa vojaĝo al alia episkopo. Anstataŭ la kardinalo, do ankaŭ dum la solena malferma kunveno ĉeestis la eparĥia vikario, monsinjoro Van den Eynden, kiu alparolis la kongreson tre elokvente, montrante sin vera propagandisto por nia katolika Esperanto movado. Ĉiutage okazis sankta Meso en la Katedralo kun Esperanto-prediko. Ĉeestis multaj diverslandaj Esperantistaj pastroj; la unuan predikon, dimanĉe do, estis tiu de pastro Eras, nia religia konsilanto.

Rimarkindan akcepton de la Antverpena skabenaro ni ĉeestis en la urbdomo. Oni montris nin dum tiu akcepto la belegajn pentraĵojn, kiuj amase kovras la murojn de la urbdomaj salonegoj. La urbestro mem ne povis akcepti nin, ĉar en la sama horo li bonvenigis en la Antverpena haveno, la Albanan eks-reĝon Zogoe, kiu precise tiun matenon alvenis en la Antverpena haveno.

DIVERSAJ KUNVENOJ.

La malferma kunveno okazis Dimanĉon je la 11.30a. Lia kardinala Moŝto, monsinjoro van Roey estante malhelpata, sendis reprezentanton en la persono de monsinjoro Van den Eynden, ĝenerala vikario. Tiu lasta paroladis tre elokvente kaj impresige en Flandra lingvo. Lin, kiel la aliajn parolantojn, tradukis Esperanten, sinjoro Calloens, kiu plenumis tiun taskon tre lerte. Sinjoro Calloens paroladis ankaŭ por la gastiganta Flandra Ligo de katolikaj Esperantistoj. Sinjoro Heilker, prezidanto de I.K.U.E., respondis ĉiujn parolantojn. Ĉar en tiu ĉi malferma kunveno parolis multaj personoj el diversaj landoj por esprimi salutvortojn kaj sentojn de kora amo al I.K.U.E. Fraŭlino Fiedler (Hungarujo) kiel ĉiam paroladis elokvente. En la kunveno de Mardo matene, Lia Moŝto pastro A. Beckers, religia konsilanto de F.U.K.E., pritraktis la ĉeftemon „La katolika laborjunularo" kaj li faris tion brile. Kompreneble post la parolado okazis viva interŝanĝo de opinioj kaj sciindaĵoj.

Tre interesa ankaŭ estis la enkonduka parolado — en alia laborkunsido — pri la temo „Klasifikado de Libroj", kiu ankaŭ okazigis viglan interparoladon.

ĜENERALA KUNVENO DE I.K.U.E.

Por la ĝenerala kunveno de I.K.U.E. estis rezervitaj du kunvenoj de la merkredo. Sed, ĉar la temoj pritraktotaj estis malmultaj, la prezidanto sukcesis ilin finpritraktigi jam dum la matena kunveno. Tiel ni ricevis pluan liberan posttagmezon. Du novaj estraranoj en la ĉefestraro de I.K.U.E. elektiĝis. La ambaŭ ĉeĥaj estraranoj ne plu povis plenumi sian funkcion, pro tio ke, kvankam ilia lando nun estas ,,protektata'', tiu protekto tamen ne koncernas nian katolikan Esperanto-movadon! Ni elektis pastron Beckers el Belgujo kaj sinjoron Petro Golobiĉ el Jeseniĉe en Jugo-Slavujo.
La ĝenerala-sekretario kaj kasisto, sinjoro de Jong raportis pri la financa situacio de I.K.U.E. kaj pri la abonantaro de ,,Espero Katolika''. Tiujn raportojn oni trovos en la unua postkongresa numero de nia internacia katolika organo kaj mi nur povas koncili, legu ilin. Se do vi ne ankoraŭ abonis ,,E. K.'', ne plu hezitu, sed mendu ĝin tuj. Dum la kunveno oni parolis ankoraŭ pri la serva organizado. La prezidanto memorigis ke dum 1940 ne okazos kongreso de I.K.U.E. Tamen, dum la granda internacia Eŭĥaristia kongreso, Majo 1940 okazonta en Nice (Francujo) oni organizos Eŭĥaristian Esperanto-mondkunvenon. Tiam — dum la Antverpena kongreso — Eŭropo ne estis ankoraŭ en milita stato. Nun — meze de Septembro — ni devos jam timi ke la somero en Nice pasos sen kongreso.

LA DISTRAĴOJ KAJ EKSKURSOJ.

Ĉiu kongresano sendube konsentos: La kongresorganizantoj ne forgesis la distran parton de la kongreso. Neforgeseblaj estis la ekskursoj al Lier, Leuven kaj al Brugge. En la lasta urbo, nomita ,,la bela'', ni vizitis la ,,Memling''-ekspozicion kaj la Ludo de la Sankta Sango. La beleco de ĉi tiu prezentado estas absolute nepriskribebla.
Kompreneble oni ne forgesis montri la vidindaĵojn de Antverpeno: la zoologian ĝardenon, la tunelojn, la muzeojn, la havenojn k.t.pl.
En la kongresejo mem ni ĉeestis muzikan prezentadon je la dimanĉo, kaj literaturan vesperon marde.
Ambaŭ vesperoj estis bone preparataj kaj akiris la meritintan sukceson.

FINA IMPRESO.

La Antverpena kongreso sukcesis, kaj tio: sendube dank' al la senlaca laboro de niaj Flandraj, kaj precipe de la Antverpenaj katolikaj Esperantistoj. Laŭdon al ili, kaj dankon.

H. D.

★★★

Van de Propagandadienst.

Hoewel de tijdsomstandigheden een flinke propaganda op het oogenblik bijna onmogelijk maken, behoeft deze toch niet geheel te worden stilgelegd. Wat ieder doen kan, is trouw zijn insigne dragen: er zijn nog honderden exemplaren in speld-, knoop- of broche-vorm voorhanden. Ook van ons mooie briefpapier en enveloppen zijn nog groote kwantums in voorraad.

Het clubleven kan in dezen tijd zelfs tot hooger peil worden opgevoerd, door het voor de leden zoo aangenaam en gezellig mogelijk te maken Waarom den moed er niet ingehouden door van tijd tot tijd eens een nummertje te zingen? Vorm in uw afdeeling een zangkoortje onder leiding van één der leden, die daartoe geschikt is; zelfs het instudeeren van de verschillende nummers is zeer amusant en komt het clubleven zeker ten goede. ,,Katolika Kantaro'' bevat 33 nummers met muziek erbij: in de advertentie kunt U zien, hoe belachelijk laag de prijs is gesteld. Dan is er nog een partijtje ,,Spijkers'' over, zeer geschikt, om individueele personen te bewerken.

Ik hoop weer een flinke partij bestellingen te ontvangen, doch niet alleen bestellingen, ook betalingen. Verschillende afdeelingen bleven tot nu toe in gebreke, het ontvangen materiaal te betalen; spaar s.v.p. mij de moeite en Uzelf de kosten van een postkwitantie. Betaling bij voorkeur per giro tegelijk met de bestelling, of tenminste zoo spoedig mogelijk na ontvangst van het materiaal.

Dordrecht, Kasperspad 91, Giro: 214009. TRUUS DURENKAMP.

★★★

Internacia Katolika Informejo.

Van de 1-cents-actie ontvangen: Utrecht 1.— gld; Alkmaar 3.20 gld; I.P.K.A. Den Haag 10.— gld; Bussum 3.— gld; van het Congres te Antwerpen 15.48 gld.
Nog ontvangen: N.N. te 's-H. 0.35 gld; W. S. te H. van goede gevers 2.— gld; G. S. te T. 2.50 gld. Aan allen hartelijk dank!
De internationale toestand zal ook zijn weerslag wel hebben op onze I.K.I. Tot nu toe hebben we echter nog geen klagen, want in de laatste tijd kwamen er nog 115 aanvragers binnen en het aantal landen vermeerderde met 3, zodat we nu 941 informpetintojn hebben uit 49 landen. Bidden we vurig om vrede, zo noodzakelijk ook voor ons werk.

Fr. M. MONULFUS, I.K.I.-Secretaris.

★★★

Uit de afdelingen.

DORDRECHT, D.E.K. Okaze de la kvinjara ekzistado de nia klubo ni havis Sanktan Meson kun ĝenerala Sta Komunio en la preĝejo de nia antaŭa Religia Konsilanto Paroĥestro Ouwendijk en Zwijndrecht, la 27-an de Aŭgusto. Post la Mezo okazis komuna matenmanĝo en la tiea paroĥa salono, post tio la jarkunveno. Ĉio okazis en bona harmonio kaj brilega humoro. Ekskurso kaj filmvespero por la geanoj bedaŭrinde ne povis okazi, kaj ankaŭ la granda propaganda vespero, kiun ni planis por la 3-a de Sept. kun parolonto S-ro P. Heilker, devis esti prokrastata pro la internaciaj malfacilaĵoj. Intertempe ni plenkuraĝe komencis nian sesan unuiĝon.

TRUUS DURENKAMP, Sekretariino.

AMERSFOORT, ,,Pastro Emiel Peltier'' Tre bonan propagandon faris la Amersfortaj Esperantistoj. Sabaton la 5-an Aŭguston estis festo por la ,,Asocio por savado de dronantoj'', ,,brigade Amersfoort'', nome la dudekjara ekzisto.
Okaze de tiu festo la asocio organizis naĝkonkursojn, La Amersfortaj Esperantistoj el ĉiuj grupoj disponigis por ĉi tiuj naĝkonkursoj belan pokalon. Ĉiuj Esperantistoj kunlaboris fervore al ĉi tiu nova propagando. La konkurspokalo estas nomita ,,Esperanto Pokalo 1939''. Ni elektis pokalon ĉar ĝi plurfoje denove estos premio en venontjaraj konkursoj. Nur post kiam iu brigado gajnis ĝin sinsekve 3 foje, aŭ kvin foje entute ĝi restas ĉe tiu grupo. Jam nun dum la ekspozicio en sportbutiko meze en la urbo oni faras efikan propagandon.
La iniciativo prenis la ,,Amersforta Propaganda Komitato''.

L. J VOGELS, sekr. P.E.P.

DEN HAAG, ,,Inter Paco kaj Amo''. Jaarvergadering 11 Sept. Propaganda in September vervalt wegens tijdsomstandigheden. Op 2 Oct. begint de cursus, waarvoor ieder lid 1 cursist aanbrenge. In plaats van Zuster Mulder werd Mej. Voerman gekozen. Op 18 Sept. uitreiking prijzen reciteerwedstrijden.

v. C.

Uit de Esperanto-Beweging.

ESPERANTO EXAMENS.

De najaarsexamens zullen plaats hebben op 4 Nov. te Utrecht voor A en B en op 18 Nov. te 's-Hertogenbosch, eveneens voor A en B.
Inlichtingen en aanmeldingen bij de Secretaris de heer H. J. Bulthuis, Kamillestraat 37, Den Haag.

ESPERANTO BIJ DE MILITAIREN.

Meer en meer begint onze wereldhulptaal ook bij de militairen door te dringen en zijn beoefenaars te krijgen.
Van 27 tot 30 Juli werd in de Katholieke Militairen-vereeniging te Soesterberg een tentoonstelling van Esperantaĵoj gehouden, welke veel bezoek trok. Reeds op den dag der opening kon worden overgegaan tot oprichting van een club van 19 Katholieke militaire-Esperanto-beoefenaars. Dezelfde tentoonstelling werd gehouden van 3 tot 6 Augustus in de Katholieke Militairen-vereeniging te Amersfoort. Na een krachtig woordje van den Directeur Kapelaan H. Kerkhofs, welke het nut van Esperanto voor den Katholiek uiteenzette, kon ook hier een club worden gevormd van 12 personen. Promotor voor deze beide expositie's was de heer C. de Groot Jr, lid van Pastro Emile Peltier te Amersfoort, thans te Soesterberg in garnizoen.
Verheugend mogen we het verschijnsel noemen dat de grootst mogelijke medewerking en steun werd verkregen reeds op het eerste verzoek van den Majoor-Aalmoezenier H. J. J. M. van Straelen, aalmoezenier in het IIe Militaire Gewest.

v. G.

RILATOJ KUN PARENCOJ KAJ AMIKOJ EN MALAMIKAJ LANDOJ

La eksplodo de la milito disigas multajn personojn en la militantaj landoj kun parencoj kaj amikoj. Por helpi ilin, la Centra Oficejo de Universala Esperanto-Asocio, Palais Wilson, Genève, starigis Servon de Perado por privataj korespondaĵoj inter la malamikaj landoj, servo funkciinta jam dum milito 1914-18 plensukcese. Korespondaĵoj estas ricevataj ĉe la Centra Oficejo en Genève, kie ili estas transsendataj al la adresato. Estas akceptataj nur ne-fermitaj korespondaĵoj kun absolute privata karaktero, sen aludoj pri politikaj aŭ militaj okazaĵoj. La personoj, kiuj deziras uzi tiun ĉi peradon, skribu al Universala Esperanto-Asocio, Palais Wilson, Genève, Svislando. aldonante du internaciajn respondkuponojn por unu sendota letero 20-grama.

NEDERLANDA ESPERANTISTO.

Het tweewekelijks orgaan van L.E.E.N. verscheen op 2 September als *propaganda* nummer. De tekst van Hans Bakker en de tekeningen van Han Bolte geven een korte uiteenzetting van het vraagstuk internationale taal en de oplossing ervan: Esperanto.

ESPERO KATOLIKA.

Het Hoofdbestuur van I.K.U.E. overweegt in hoeverre het mogelijk is door te gaan met het laten verschijnen van het internationaal orgaan „Espero Katolika". Het volgend nummer, dat het volledige Congresverslag zal bevatten, verschijnt half October a.s.

NoSoBE.

Antaŭ kelka tempo la estraro de „NoSoBE" dissendis cirkuleron al ĉiuj sekcioj de la nederlandaj Esperanto-unuiĝoj, en kiu ĝi petis, ke oni fariĝu donacanto de nia finance malforta societo. La estraroj de la diversaj unuiĝoj kompleze helpis nin, kaj multaj, ĉu sekcie, ĉu individue, reagis al nia alvoko kaj fariĝis donacantoj. Al ĉiuj nian koran dankon! Sendante nun la monon al la kasisto, oni tre faciligus lian taskon kaj ŝparus al ni poŝtkostojn. Anticipan dankon por tio!
La Jubilea kongreso de „NoSoBE", okazinta la sesan de Majo, fariĝis sukcesa. Estis sufiĉe granda partopreno, ĝojige viglaj interesiĝo kaj partopreno ankaŭ de ekstere kaj fruktoportaj pritraktoj. La plej menciindaj faktoj el la jarraporto estas, ke dum 1938 la membronombro kreskis de 89 ĝis 95, la statutoj de „NoSoBE" estas leĝe aprobitaj kaj la bralja organo „La Kontakto" plivastiĝis de kvar ĝis ok numeroj en jaro.
La bralja van Straaten-vortaro nun plene aperis. Ĝi aperis entute en 13 grandformataj volumoj, en stoko de po cent ekzempleroj. Kostoj ĉ. F. 3.000,—, do po F. 30,— por plena kolekto. Membroj pagas por ĝi 13 oble F. 0,60 estas F. 7,80, nemembroj 13 oble F. 1,10 estas F. 14,30. La trivoluma parto esp.-ned.a jam plejgrandparte disvendiĝis, la dekvoluma parto ned.-esp.a iom pli ol duone. Feliĉe restis ankoraŭ mono por nova eldono de la unua parto.

(*„El nia Medio" Aug. 1939.*)

★★★

ESPERANTO RADIO-PROGRAMO DE RADIO ÉIREANN, 1939 (531 metroj).

Titolo	Dato			Daŭro	Detaloj.
Popularaj kantoj de Irlando	dim.	Okt.	1	25 m.	Laŭ Esp.-lingva traduko
La ĉefreĝoj de Irlando	mard.	Okt.	17	15 m.	Niaj reĝoj dum 3000 jaroj
Ora epoko en nia historio	dim.	Nov.	5	15 m.	Irland. sanktul., festtago Nov. 6
La skolta movado	mard.	Nov.	21	15 m.	Programo por geskoltoj
Kristnasktempaj Kutimoj	dim.	Dec.	3	15 m.	Kio okazas kutime dum Dec.
Kristnaska teatraĵeto	mard.	Dec.	19	25 m.	Speciala prezentaĵo

(a) Fiksu tiun ĉi programon apud via ricevilo;

(b) Aŭskultu; notu detalojn kaj priparolu la temon poste en via klubo;

(c) Sendu aŭskultateston post ĉiu ricevo. Adr.: Radio-Stacio Dublin, Irlando.

(d) Elsendhoro: Inter 6 kaj 6.30 vespere G.M.T. (Somere laŭ G. Somera tempo);

(e) Klubanoj petu tiun ĉi programon de Lorcán ó hUiginn, 39 Westmoreland str., Dublin.

★★★

Binnen- en buitenlands Esperanto-nieuws

FRANKRIJK.

In Marseille, de 2e stad van Frankrijk zal volgend jaar het Neutrale Internationaal Esp. Congres gehouden worden. Als tenminste de internationale toestanden dat toelaten.

VERENIGDE STATEN.

„Norma Shearer" zei over Esperanto: „Ik kan goed constateren dat E. niet alleen vloeiend te spreken is maar ook dat de taal muzikaal klinkt en helder en natuurlijk is."

CHINA.

Om aan de gehele wereld de „waarheid" te tonen over de Japanse invasie geven Chineese Esperantisten een maandblad uit „Voĉoj el Oriento".

AUSTRALIË.

E. wordt ook veel gebruikt in dienst van politieke vluchtelingen. De Esp.-club in Melbourne geeft inlichtingen aan hen die in Australië willen willen binnenkomen. Het adres: Melbourne P.O. Box 2212 T. Aŭstralio.

ITALIË.

E.I.A.R. geeft maandelijks een brochure uit van de radiouitzendingen van Italiaanse stations. Dit boekje wordt kosteloos verspreid. Te verkrijgen: La Esperanta voĉo, via Montelle 5, Roma, Italujo.

HONGARIJE.

Ook Hongarije was officieel vertegenwoordigd op het Universele Esperanto Congres te Bern (Aug. 1939). De regering zond als haar vertegenwoordiger Prof. J. de Mihalik.

AMERIKA.

R.K.O., de bekende filmfabriek, gebruikt ook E. in haar nieuwe film „Conspiracy".

FINLAND.

Op het 22e internationale antie-alcohol congres (30 Juli—4 Aug. '39) te Helsinki werd een bijeenkomst gehouden van Esperantisten-deelnemers van het Congres. Het orgaan van Spoorwegpersoneel bevatte artikelen over drankbestrijding in verschillende talen waaronder Esperanto.

AMERIKA.

Op de Wereldtentoonstelling te New-York, werd ter gelegenheid van het 32ste kongres van de Noord-Amerikaanse Esperanto-vereniging, een Esperanto-dag ingericht.

BELGIË.

Door de Belgische Katholieke Radio-Omroep wordt elke eerste en derde Dinsdag der maand, tijdens het kinderuurtje, ,,het minuutje Esperanto'' verzorgd. Ook hier is de leus: ,,Zo dikwijls is men een mens als men talen spreken kan''.

DENEMARKEN.

Dat er in dit land veel van de wereldhulptaal verwacht wordt, bewijst wel het feit dat in de Gemeenteschool van Fakse-Ladeplads, Esperanto als verplicht leervak werd ingevoerd.

EGYPTE.

Van 21 tot 27 September 1939 richtte het ,,Algemeen Esperanto-bureau voor Toerisme in Egypte zijn 4de Esperanto rondreis in door het land der pyramiden.
Prospektussen in Esperanto zijn te verkrijgen bij dit bureau dat gevestigd is te Port-Said (Egypte), Mokattam No. 10.

FRANKRIJK.

Benevens verscheidene andere talen past het laboratorium van A. E. Négrel, eerste-klas plantenapotheker te Marseille, ook Esperanto toe in alle verklaringen en aanwijzingen voor het gebruik van zijn geneeskundige produkten.

ITALIË.

Te Turijn werd een prachtige propaganda-brochure uitgegeven, helemaal in Esperanto opgesteld en met duidelijke foto's in koperdiepdruk.

NEDERLAND.

In het Nederlandse weekblad ,,De Goede Tempelier'', orgaan van de grootloge van de Internationale Orde van Goede Tempelieren verschijnen regelmatig artikelen in Esperanto.

NOORWEGEN.

Een prachtige brochure, helemaal in Esperanto opgesteld, en handelend over de wonderschone Haugastreek en haar bezienswaardige hoofdplaats, zag zoo juist het licht. Deze kunst-brochure zal wellicht veel bijdragen om een deel van het lieve Noorwegen heinde en ver gekend te maken. Zij is kosteloos te bekomen op eenvoudige navraag aan het volgend adres: ,,Turisttrafikknevnden, Haugesund, Norvegujo''.

Boekbespreking.

(Recensie-exemplaren te zenden aan het Redactie adres.)
(Recenzotajn verkojn sendu al la redakcia adreso.)

KULIO. M. H. Székely-Lulofs. Tradukis el la nederlanda lingvo P. J. Makkinjè. Eldono: Libro Servo de F.L.E., Amsterdam.

Malgraŭ la bona lingvo, ni ne povas rekomendi ĉi tiun libron. Ni kompreneble ne aprobas la sistemon de kontraktado. Ni kompreneble kompatas la kontraktkulion kaj abomenas la sintenadon de la superuloj, kiuj misuzas sian potencon. Sed ni ne povas rekomendi libron, kiu krude priskribas senĝenaĵojn kaj en kiu oni senreserve blasfemas. Por katolikoj ĉi tie validas la naturleĝo, kiu malpermesas legadon de libroj, kiuj endanĝerigas la animan vivon.

HOMOJ EN MILITO. Andreas Latzko. El la germana lingvo tradukis C. Minor, L.K.

MARCIA REALE. Andreas Latzko. tradukis N. Bartelmes. — Eldono: Libro Servo de F.L.E., Postbus 4050, Amsterdam O.

La aŭtoro en 1914 iris kiel reservoficiro al la itala fronto kaj tie travivis la teruraĵojn de la milito. Post okmonata restado en lazareto li ricevis forpermeson kaj verkis en Davos la 6 novelojn, kiuj nun aperas ankaŭ en Esperanto. La verko estas multlegata, ĉar jam aperis en 19 lingvoj. Ĝi priskribas kiel homoj en milito mortas kaj mortigas, kiel homoj en milito bestiĝas aŭ freneziĝas. La noveloj sentigas abomenon kontraŭ la milito. Tamen: homoj en milito ankaŭ havas animon. Kaj pri tiu silentas la aŭtoro. Milito estas abomeninda, ne nur ĉar tiom da homaj korpoj estas buĉataj, ne nur ĉar ĝi kaŭzas tiom da mizerego. Sed precipe ĉar perdiĝas, eble perdiĝas por ĉiam, tiom da homaj animoj, kvankam la ĉiam bona Dio certe multajn el ili juĝos kun Dia kompato. Jen nia rimarko, kiun ne forgesu la katolikoj, kiuj havas sufiĉe fortajn nervojn, por povi legi la teruraĵojn, ĉar nur al tiuj ni povas rekomendi la legadon de ĉi tiu libro, pri kies lingvo kaj stilo ni povas diri nenion krom laŭdon.

★★★

OPROEP.

Voor een in nood verkerende Duitse Esperantisten-familie vraag ik één keer Uw gaven in geld. Het bedelen gaat mij slecht af, maar waar ik de ellende zelf aanschouwd heb en reeds boven mijn krachten heb geholpen, kom ik nu tot U. Stel mij niet teleur. God zegene U voor uw hulp! Verantwoording éénmaal in dit orgaan.

POSTREKENING 38247, HOOFDDORP.

P. HEILKER

Por amuzo.

La plej nigra momento de l' vivo.

Junulo senmona deziris sin svati al riĉulino. Okaze en butiko li rimarkis, kiel senzorga komizo ĵus faligis belan kaj multekostan vitran pelvon, tiel ke ĝi dispeciĝis.
,,Je kiu prezo vi vendos al mi tion?''
,,Al vi? — tian rompitaĵaron? Nu, je unu ŝilingo.''
,,Jen la ŝilingo! Bonvolu sendi la restaĵojn de la pelvo, zorge pakitajn en malfirma papera skatolo, al f-ino...., laŭ la adreso sur ĉi tiu papero!''
Kompreneble la ruzulo esperis, ke....
Sed kiam la sekvintan fojon li vizitis la enkorpiĝon de siaj esperoj, ŝi montris al li, kiel la ,,pelvo'' ja bone alvenis. Sed la zorga komizo penplene estis envindinta ĉiujn vitropecetojn — ĉiujn aparte — en maldikega papero.
Lasta vizito!

(*Heroldo*)

★

Almozpetanto: Ho, sinjorino komplezu doni al mi pecon da pano, ĉar postmorgaŭvespere jam estos pasintaj du tagoj dum kiuj mi nenion manĝis.

★

La venĝo de pumpisto.

Okaze de paroĥa festo la ĥoro aŭdigis belegajn meskantojn. Ĉiu kunlaboris por sukcesigi la feston. Post la Sankta Meso la organisto staris ĉe siaj amikoj antaŭ la preĝejo kaj iom fanfaronis pri sia ,,arta ludado''. Li diris: ,,Tion mi faris belege, ĉu ne?''
Sed alie opiniis la knabo, kiu prizorgis la pumpilon de la orgeno. Li diris: ,,Ne sinjoro, vi ne faris tion sola, ankaŭ mi helpis.'' ,,Kiu ludis?'' demandis la fiera orgenisto. ,,Vi, kompreneble'', respondis la pumpisto, ,,sed ankaŭ mi helpis, do **ni** faris tion kune kaj ne nur vi''. ,,Silentu'', responde diris la orgenisto, iom koleriĝante, ,,mi ludis, do **MI** faris tion tiom belege!'' La pumpisto foriris kaj ekpensis pri efika venĝo. Dum la Laŭdservo en la posttagmezo, la orgenisto, tute forgesinte la disputon, ektuŝis la klavojn. Nenia sono! ,,Kio estas?'' li kolere demandis al la pumpisto. ,,Ho, nenio! Nur, **NI** ne ludas tiel belege, kiel hodiaŭmatene'', respondis la bubo, ridante pro sia efika venĝo. (A.B.)

★★★

Leterkesto.

Al A. B.

Poemon bezonos ioman korekton. Eble ni uzos ĝin. Enigmo en tiu formo ne solvebla. La ceteron vi trovos. Dankon.